## Demandoj ne pri la rakonto:

*Bestoj:*

**1.** Kiom da bestoj loĝas en via domo? Se estas pli ol unu, respondu pri unu el ili: Pri kiu besto vi respondas? Kiukolora ĝi estas? Kiu estas ĝia nomo? Ĉu ĝi estas milda aŭ sovaĝa? Kie ĝi dormas? Kion ĝi manĝas? Ĉu ĝi estas granda aŭ malgranda? Ĉu ĝi bone aŭ malbone kondutas?

**2.** Ĉu koko aŭ kokino loĝas en via ĝardeno? Kie ili kutime loĝas? Kial kokinoj estas utilaj bestoj por homoj?

**3.** Ĉu hundo loĝas en via domo? Kial hundoj estas utilaj bestoj por homoj?

**4.** Ĉu vi ŝatas katojn? Kiel vi alvokas katon en via lingvo? Ĉu kato loĝas en via domo? Ĉu katoj estas utilaj bestoj por homoj?

**5.** Ĉu elefanto loĝas en via domo? Ĉu vi ofte vidas elefantojn en via urbo? Ĉu vivas elefantoj en via urbo? Se jes, kie? En kiuj landoj oni trovas multajn elefantojn? Kial elefantoj estas utilaj bestoj por homoj?

## Ekzerco spac-pleniga:

*Plenigu la spacojn por produkti bonajn frazojn. La sep unuaj frazoj rilatas al la rakonto, la postaj frazoj ne rilatas al ĝi:*

| | | | |
|---|---|---|---|
| 1. | Koko | flugis | al la stacid.......... |
| 2. | La stacidomestro | k.......... | al la telefono. |
| 3. | La kato | falis | de la br.......... |
| 4. | La h.......... | dormis | apud la barilo. |
| 5. | La vekhorloĝo | st.......... | sur la tablo. |
| 6. | La viro | p.......... | al la p.......... |
| 7. | La.......... | forveturis | de la.......... |
| 8. | Mi | loĝas | en ..........a domo. |
| 9. | La.......... | ..........as | sub la.......... |
| 10. | .......... | laboras | en.......... |
| 11. | Mia amiko | ..........as | apud.......... |
| 12. | .......... | ..........as | en la urbocentro. |
| 13. | Vendistoj | ..........as | en.......... |
| 14. | .......... | flugas | .......... |
| 15. | .......... | ..........as | en la ĝangalo. |
| 16. | .......... | ..........as | kun laŭta bruo. |

## Kaj ankoraŭ io...

*Parigu la frazo-partojn por fari bonajn frazojn:*

| | | |
|---|---|---|
| 1. | La profesoro... | ...krias "Kokadudildu!" |
| 2. | La vekhorloĝo... | ...estas nigra kaj densa. |
| 3. | La koko... | ...krias "Revenu!" |
| 4. | La hundo... | ...falas kaj frapas la telefonon. |
| 5. | La kato... | ...fajfas kaj forveturas de la stacidomo. |
| 6. | La trajno... | ...vekas la kokon. |
| 7. | La sonorilo... | ...falas de la arbo. |
| 8. | La fumo... | ...ankoraŭ dormas. |
| 9. | La stacidomestro... | ...bojas. |

*Se oni misparigas la frazopartojn, la rezultoj povas esti amuzaj. Elektu unu misparon kaj faru desegnaĵon pri ĝi.*

Ekzemple:

La vekhorloĝo...krias "Kokadudildu!"




**Ĉapitro tri: La nova observisto**

## Demandoj pri la rakonto:

1. Kie estas la ŝipo? Kiuj staris sur la ferdeko de la ŝipo?
2. La subŝipestro diris: "Ni havas grandan problemon." Kiun?
3. Kiel la ŝipestro solvis tiun problemon?
4. Kiu falis de la kajo al la ferdeko? Kial tiu venis al la haveno?
5. Kiu pridemandis la malaltan viron? Kiu skribis la respondojn?

6. Al kiom da demandoj respondis Lo Z... ?
7. Kiu demando estis la plej malfacila?
8. Ĉu la malalta viro donis ĝustajn respondojn al la demandoj?
9. Kio estas la diferenco inter observisto kaj servisto? Ĉu estas gra... da diferenco? Kial Lo diris, ke estas malganda diferenco?
10. Kiu estas la plej inteligenta persono sur la ŝipo?
11. Kiu estas la plej malinteligenta persono sur la ŝipo?
12. Kial la ŝipestro gratulis la malaltan viron?
13. Kie estas la holdo? Kie estas la observejo? Kie estas la ankro?
14. En la fino de la ĉapitro, Lo rigardis supren kaj diris "Glut'!". Kial...

## Demandoj ne pri la rakonto:

*Labori:*

Kie vi laboras? Ĉu vi laboras en granda ĉambro? Ĉu vi laboras di... gente? Kian laboron vi faras? Ĉu vi laboras ĉiutage? Ĉu via laboro est... interesa? Kiu parto de via laboro estas plej interesa? Kiu parto est... plej malinteresa? Ĉu vi laboras en la semajnfino? Kie? Ĉu vi ofte lab... ras en ĝardeno? Ĉu vi havas aŭtomobilon aŭ motor-biciklon aŭ b... ciklon? Ĉu vi ofte laboras por ripari ĝin? Ĉu vi jam laboris en haven... Ĉu vi iam laboris en stacidomo?

*Skribi:*

Ĉu vi ofte skribas leterojn? Ĉu via manskribo estas bela? Ĉu vi prefer... uzi skribmaŝinon? Ĉu vi kutime skribas longajn aŭ mallongajn leteroj... Sur kio vi kutime skribas? Per kio vi kutime skribas? Pri kio vi kutim... skribas? Kiom da leteroj vi kutime skribas en semajno? Ĉu vi multe skri... bas pro via laboro aŭ studado?

*Grimpi:*

Ĉu vi ŝatas grimpi? Kion vi kutime grimpas? Ĉu vi iam grimpis ĝis la su... pro de masto? Kiu estas la nomo de la plej alta monto, kiun vi grimp... en via vivo? Kie ĝi troviĝas? Rakontu kiel estis.



## ...kzerco vort-klariga:

...larigu en Esperanto la signifojn de la vortoj: kuirejo, haveno, holdo, ...apo, idioto, observisto, masto, bruo, stacidomo, telefono, lokomotivo, ...gmento, horloĝo, mateno, piedo, klapo, oferto.

## ...aj ankoraŭ io:

*...rku mallongan rakonton pri unu el la jenaj temoj:*

1. Mia unua interparolo por havi laboron.
2. La demandoj en mia lasta ekzameno.
3. Grava afero, kiun mi forgesis.
4. Mi kaj kuirejoj.

**Ĉapitro kvar: Li ankoraŭ dormas**

## ...emandoj pri la rakonto:

... Kie fajfis la lokomotivo? Kiel ĝi fajfis?
... Ĉu la bruo vekis la profesoron?
... Kion li faris antaŭ la fajfado? Kaj poste?
... Kion la trajno baldaŭ atingos?
... La trajno venos al la levponto tro frue. Kial?

## ...emandoj ne pri la rakonto:

1. Kio estas videbla de la fenestro de via dormĉambro?
2. Kio estas aŭdebla de la fenestro de via dormĉambro?
3. Ĉu io aŭ iu ofte faras bruon apud la fenestro de via dormĉambro? ...ion vi faras pro tio?
4. Je kioma horo vi kutime vekiĝas en semajna tago? En sabato? En ...imanĉo? En ferio? Je kioma horo vi vekiĝis hodiaŭ?

**5.** Kio aŭ kiu kutime vekas vin en la mateno? Ĉu bruoj facile vek
vin? Ĉu lumo facile vekas vin? Ĉu personoj facile vekas vin?

**6.** Ĉu vi havas vekhorloĝon? Ĉu ĝi estas laŭta? Ĉu ĝi estas tro laŭta a tro mallaŭta? Ĉu ĝi estas bela? Ĉu ĝi vekas vin je la ĝusta horo? Ĉu estis donaco al vi aŭ ĉu vi aĉetis ĝin?

**7.** Ĉu via vekhorloĝo estas mekanika aŭ elektronika? Kiun specon preferas? Kiaj estas la avantaĝoj kaj malavantaĝoj de elektronikaj ve horloĝoj kompare kun mekanikaj? Ĉu vi kutime saltas entuziasme via lito? Ĉu vi ofte falas el via lito?

**8.** Ĉu vi dormas apud fenestro? Ĉu vi dormas en ĉambro kun fermi aŭ malfermita fenestro?

**9.** Kion vi kutime trinkas en la mateno? Kie vi trinkas la unuan tri kaĵon de la tago? Kiu preparas ĝin? Ĉu vi kutime manĝas abundan m tenmanĝon?

**10.** Ĉu vi ofte vidas la sunleviĝon? Kial ne!?

*Foriri:*

**11.** Je kioma horo vi foriras de via domo en la mateno? Kiu foriras unua de via domo? Ĉu vi ofte foriras malfrue? Kial?

**12.** Kio foriras de stacidomo? Kio foriras de haveno? Kio foriras d flughaveno? Kio foriras de raket-lanĉejo? Kiu foriras de malbona ko certo?


## Kaj ankoraŭ io... krucvortenigmo:

**Horizontale**

2. Duono de kvaroble kvar.
4. La plej grava persono en ŝipo, oficejo, butiko aŭ stacidomo.
7. "La subŝipestro .......... al li kaj helpas lin."
8. Ŝipoj faras multe ...... bruo.
9. "La lokomotivo .......... laŭte apud la fenestro."
12. Duono de nomo, sed nur triono de haveno!
13. "La profesoro ankoraŭ .........."
15. Ĝis .....vido!
16. "La estro .......... al li kaj diras 'Bonan tagon'!"
18. Neniu alia estas apud mi. Mi estas ..........

**Vertikale**

1. Dekono de cento.
2. Bronza, arĝenta, ..........
3. Dek mil dolaroj? Mi ne aĉetos ĝin! Ĝi estas tro ..........
5. Norda, okcidenta, orienta kaj ..........
6. "La .......... venos tro frue al la ponto."
10. "La trajno .......... de la stacidomo."
11. "La vekhorloĝo .......... sur la tablo apud la lito."
13. "Ĝi iras apud la .......... kie dormas la profesoro.
14. Kvaroble naŭ dividita per duoble tri.
17. "La lokomotivo venas...... la domo".



La subaj numeroj donas kaŝfrazon; trovu ĉiun numeron en la enigmo kaj skribu anstataŭe la literon, kiu okupas tiun kvadraton. Sendu al ni la kaŝfrazon, kune kun aliaj, por partopreni en loterio. Detalojn pri tio vi trovos sur paĝo 173. Jen la kaŝfrazo:

18,17,3,4,6,2. 9,15,17,3,17,18,2,5. 10,4,12,4,18,6,15,2,12.

## Demandoj pri la rakonto:

1. Kie staras la malgranda domo? Kiuj loĝas en ĝi?
2. Kio sonis en la domo? De kie venis la sono?
3. Kial la edzo ne tuj respondis al la telefono?
4. Kiu telefonis al la pontestro? Kion li volis?
5. La edzo kaj edzino unue serĉis la telefonon. Kion ili poste serĉis? Kial ili serĉis tion?
6. Kioma horo estis, kiam la edzo parolis per la telefono?
7. Je kioma horo la edzo intencis mallevi la ponton?
8. Kial la edzo intencis tiam mallevi la ponton?

## Demandoj ne pri la rakonto:

*Je kioma horo...*

**1.** Je kioma horo vi saltas el la lito en lunda mateno? En dimanĉa ma[teno]? Je kioma horo vi kutime enlitiĝas?

**2.** Je kioma horo vi kutime alvenas hejmen en semajna tago? Je kiom[a] horo vi kutime manĝas la vespermanĝon?

**3.** Je kioma horo komenciĝas la novaĵoj en la televido? Je kioma hor[o] ili finiĝas? Je kioma horo komenciĝas via plej ŝatata televida programo? Je kioma horo ĝi finiĝas? Kiu estas ĝia nomo? Kia programo ĝi estas? J[e] kioma horo finiĝas la televidaj elsendoj en lundo? Je kioma horo ili fi[]niĝas en sabato?

**4.** Je kioma horo vi komencis legi ĉi tiun libron? Je kioma horo vi fi[]nos la studadon?

*Serĉi:*

**5.** Ĉu vi ofte serĉas aferojn? Ĉu en via dormo-ĉambro kuŝas multaj p[a]peroj? Ĉu vi serĉis ion hodiaŭ? Kion vi plej ofte serĉas? Ĉu viaj serĉ[oj] ĉiam sukcesas?



*Telefonoj:*

6. Ĉu estas telefono en via domo? Kiukolora ĝi estas? Kie ĝi staras? Kiu plej ofte uzas ĝin? Ĉu vi havas duan telefonon en via domo?

7. Ĉu vi parolas longe per telefono? Kiam okazis via plej longa telefonvoko? Ĉu vi jam parolis per telefono dum pli ol unu horo? Kiaj personoj ofte faras longajn telefonvokojn? Al kiu vi ofte telefonas? Al kiu vi malofte telefonas? Al kiu vi neniam telefonis? Ĉu vi ofte telefonas internacie? Ĉu la telefono estas utila inventaĵo? Ĉu vi iam malŝatas telefonojn?

## Ekzerco pri horloĝoj:





Estas la .......... horo.
Post unu horo estos la ........... horo.

Estas la ......... horo.
Antaŭ unu horo estis la .......... h..........





Estas la .......... tridek.
Post unu horo estos la ........... tr...........

Estas .......... minutoj post la ..........
Post dudek kvin minutoj estos ..........





Estas .......... m.......... post la ..........
Antaŭ .......... minutoj estis la dua dek kvin.

Estas ......
Antaŭ kvardek minutoj estis ......



Estas ..........
Antaŭ ..........